

# Dek jaroj de la Esperanto-Muzeo en Svitavy

## 1. Sondo en la historion, aŭ: kiel realiĝas la revoj

Kiel mi promesis en la pasinta numero, mi volis nur skize bilanci la agadon en la lastaj dek jaroj. Tamen mi konkludis, ke estus utile unue menciigi necesajojn pri la historio ne nur de la projekto, sed ankaŭ de la loko por respondi al pluraj oftaj demandoj pri la estiĝo kaj funkciado de la muzeo. Por ne fari la artikolon tro longa kaj teda, mi ricevis la permeson de la redaktoro daŭrigi pri la muzea agado sekvont-numere.

Bildo de la romantika turhava ruĝbrika konstruaĵo, troviĝanta ie en Ĉeĥio, dum la lastaj jaroj diskoniĝis en Esperantujo. Kial la muzeo troviĝas ĝuste en Svitavy, sed ne en alia urbo? Kia estas la historio de la domo, kaj kial kaj kiel ĝi ligiĝis al Esperanto? Kiu estis Ottendorfer, laŭ kiu ĝi estas nomita? Kiel eblas, ke en tia luksa domo povas funkcii muzeo, bazita sur volontula bazo? Gravus substreki, ke la statuso de la svitava muzeo iom diferencas de la aliaj en la mondo. Ĝi estas nek profesia institucio (kiel en Aŭstrio), nek havas akademian bazon (kiel en Ĉinio), nek estas privata movada afero sendependa de la eksteraj instancoj (kiel en Katalunio aŭ Francio). Ĝuste por iom kompreni la situacion necesas diri unue kelkajn vortojn pri la domo kaj ĝia fondinto. Kaj sekve ni vidos, ke por sukcesi realigi sian revon, ofte gravus ne nur persiste labori kaj esperi, sed ankaŭ akiri la favoron de la ĝustaj homoj en la ĝusta momento sur la ĝusta loko...

La urbo Svitavy, en kiu nun troviĝas la Esperanto-Muzeo, estas distrikta urbo kun ĉ. 17 mil loĝantoj, situanta en la centro de Ĉeĥio, en la historia mikroregiono nomata Bohemia-Moravia Landlimo. La urbo, fondita en la 13a jarcento, estis loĝata plejparte de germanparolantoj, kaj en la 19a jarcento pro rapida evoluo de la tekstila industrio ĝi estis nomata la Moravia Manĉestro. Ekde 1933 en ĝi funkciis Esperanto-klubo.

La domon, en kies teretaĝo nun la Esperanto-Muzeo troviĝas, konstruigis en 1892 surloke de sia naskiĝdometo la loka mecenato, germanparolanta ĵurnalisto Valentin Oswald Ottendorfer (1826-1900). Filo de teksisto, havanta 11 gefratojn, pro sia talento li bonŝance povis studi.



En 1848 li aktive partoprenis la revolucian batalon kaj korespondis i.a. kun Bakunin. Ĉar pro tio minacis lin aresto, post unujara restado en Germanio, sen adiaŭo kun la familio kaj senmone li migris al Usono. (Parenteze, tio similas al la pli juna Francisko Valdomiro Lorenz, lia ĉeflingva samlandano, kiu pro politikaj kialoj en 1893 kaŝe migris al Brazilo).

Kvankam en Novjorko Oswald komencis kiel simpla dungito, li iĝis sukcesa personigo de la “usona revo”. Li eklaboris poste kiel kompostisto kaj pli poste kiel redaktoro en la plej granda germana ĵurnalo *New-Yorker Staats-Zeitung*. En 1859, li kaptis la koron de la vidvino de la posedinto de la ĵurnalo kaj de la presejo kaj edziĝis al ŝi. Sub lia gvido la entrepreno floris, Ottendorfer iĝis riĉa kaj prestiĝa homo, kaj preskaŭ iĝis la urbestro de Novjorko. Kun sia edzino li aktivis en multaj bonfaraj agadoj – ĝis nun funkcias de li fonditaj lernejoj kaj aliaj institucioj. Inter ili ankaŭ la Publika Biblioteko de Novjorko (1883-84) apud Manhattan, registrita en la listo de la memorindaĵoj de Usono (*vidu la fotojn*).

Li ne forgesis ankaŭ sian naskiĝurbeton Svitavy. Krom hospitalon kaj orfejon kun malriĉulejo li konstruigis en 1892 laŭ la simila usona stilo ankaŭ la domon, kiu post lia morto portas lian nomon. En ĝi li fondis bibliotekon kaj legejon (nomatan laŭ la koloro de la brikoj “Ruĝa Biblioteko”), kiu iĝis la plej moderna kaj la plej granda germanlingva publika biblioteko en Moravio. En la unua etaĝo troviĝis bela kultura salonego, uzita kaj ĝis nun uzata por prelegoj, koncertoj kaj teatraj spektakloj.

Dum la Dua Mondmilito multaj el la 23 mil volumoj estis forŝtelitaj aŭ neniigitaj, kaj nur ĉ. 5 500 volumojn oni sukcesis savi kaj konservi en la deponejo de la Urba Muzeo. Dum sesdeko da postmilitaj jaroj la domo servis kiel la urba kulturdomo. Kaj nur en 2008, kiam proksime, danke al la rekonstruo de la antaŭa fabriko, estiĝis nova moderna plurfunkcia kulturcentro, liberiĝis spaco en la teretaĝo, kaj oni serĉis dignan utiligon por ĝi. Ĝuste tiumomente venis “en la ludon” Esperanto...

Sed ni denove revenu en la historion. Post la falo de la Fera Kurteno en 1989, malgraŭ la akirita sopirita libereco novaj ekonomiaj kondiĉoj alportis neantaŭviditajn



Publika Biblioteko fondita de Ottendorfer en Novjorko. (Foto: Alex Lozupone). Fonto: Wikimedia Commons [https://en.wikipedia.org/wiki/Ottendorfer\\_Public\\_Library\\_and\\_Stuyvesant\\_Polyclinic\\_Hospital#/media/File:Loz\\_ottenF.jpg](https://en.wikipedia.org/wiki/Ottendorfer_Public_Library_and_Stuyvesant_Polyclinic_Hospital#/media/File:Loz_ottenF.jpg)

komplikaĵojn al la Esperanto-movado en la ekssocialismaj landoj. En 1994 Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA) kaj Praga Esperantista Klubo (PEK) devis forlasi siajn oficejon kaj klubejon, ĉar en la urbocentro de Prago la luprezoj freneze altiĝis. Venis urĝa demando: kie savi la arkivon, libroservon kaj la bibliotekon de ĈEA, ankaŭ la bibliotekon de PEK kun preskaŭ 6000 volumoj. Ekde tiam plurfoje ŝanĝiĝis stoklokoj, sed la stato estis daŭre nekontentiga kaj por la asocio finance postulhava. Tiam la prezidanto de la loka Esperanto-rondeto en la urbo Česká Třebová estis samtempe vicurbestro kaj direktoro de la Urba Muzeo. Danke al lia bonvolo kaj streboj de Petro Chrdle oni sukcesis tie senpage stoki almenaŭ la bibliotekon de PEK kaj la bazan arkivon. Tamen post la morto de la direktoro la cirkonstancoj ŝanĝiĝis kaj ne plu realis tie estigo de ia asocia centro aŭ almenaŭ malgranda ekspoziciejo. Nun la Esperanto-kolekto en Česká Třebová estas posedaĵo de la tiea muzeo, ĝi estas leĝe registrita, do ne eŝetebla, kaj senpage konservata, ordigita kaj baze flegata kaj por seriozaj esplorantoj vizitebla laŭ la antaŭa interkonsento. Krom tio ekzistis aliloke ankaŭ la biblioteko de ĈEA, kiu restis posedaĵo de la asocio kaj servis kiel bazo por la posta muzeo.

Kaj nun venas ligiĝo de la historio al la Domo de Ottendorfer.

En Svitavy, proksime al Česká Třebová, vivis tiama estraranino de ĈEA Libuše Dvořáková (koincide kun la sama familia nomo kiel la mia, sed neparenca al mi). Parto de ŝia persona vivorevo ankaŭ estis starigi Esperanto-muzeon kaj renkontiĝejon, kaj ŝi serĉadis dum pluraj jaroj taŭgan lokon por ĝi. La historio ripetigis – ŝi sukcesis favoriĝi por la ideo sian delongan konatinon, la direktorinon de la Urba Muzeo kaj Galerio (UMG). Tiu ekŝatis la ideon kaj promesis helpon. Kiam en 2008 liberiĝis parto de la teretaĝo de la Domo de Ottendorfer, venis la momento “M”. Danke al la kunlaboro inter la urbo, UMG (kiu administris la domon), ĈEA kaj la loka Esperanto-klubo, mirinde rapide kaj kuraĝe estis starigita la projekto pri Esperanta muzeo. Favora cirkonstanco estis ankaŭ tio, ke la domo estis destinita precipe por senprofitaj kulturaj kaj klerigaj celoj, kion nia projekto plenumis.

La malplenigita ejo estis en malbona stato, kaj tial komence necesis multa fizika volontula laboro precipe de la lokaj esperantistinoj kaj de iliaj familianoj. La riparado de la ejo kaj ekipo per meblaro ĉiukaze ne povus okazi sen subvencioj. La plej gravaj estis tiuj de la Ĉeĥia Ministerio pri Kulturo, ricevita danke al la lastmomenta interveno de la tiama urbestro de Svitavy, kaj de la fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF). Por ke la meblita salono iĝu vera muzeo kun ekspozicio kaj informpanelo, necesis plua postulhava psika laboro farita en la hejmoj precipe de la ekstersvitavaj esperantistoj, plejparte de la tiamaj estraranoj. Ĉio kulminis kaj samtempe komenciĝis per oficiala inaŭguro la 20an de septembro 2008. Detalojn pri la solena malfermo de la muzeo eblas legi en la speciala numero de la ĈEA-gazeto *Starto*:

[http://muzeum.esperanto.cz/soubory/Starto\\_2008%20-%20eksterordina-ra\\_%20muzea\\_numero.pdf](http://muzeum.esperanto.cz/soubory/Starto_2008%20-%20eksterordina-ra_%20muzea_numero.pdf)



Volontuloj multe laboris, por ke la muzeo ekfunkciu.

Jure la muzeo estas iom nekutima. Ĝi estas organiza unuo sen jura memstar-eco, apartenanta al ĈEA. Kvankam ekde 2011 en la domo ĈEA povas havi sian oficialan adreson (sed ne la oficejon), la domo mem estas posedaĵo de la urbo kaj estas administrata de UMG. La biblioteko kaj teknikaĵoj estas havaĵo de ĈEA, same kiel plejparto de la meblaro (nur parto estas pruntedonita de UMG). Laŭ la kontrakto kun la urbo ĈEA estas en la domo en senpaga luo, rekompence al tio ĈEA kunlabore kun la loka Klubo de amikoj de Esperanto per propraj fortoj kaj rimedoj zorgas pri funkciado de la ejo, pri ĉiujara pretigo de nova ekspozicio kaj pri uzebleco de la ejo por aranĝoj ne nur esperantistaj, sed ankaŭ por la loka publiko. Krome ĈEA klopodas senpage pere de Esperanto diskonigadi la urbon kaj la regionon, kio ankaŭ postulas multan kroman laboron. Tio utilas por la urbo, do la kontrakto estas reciproke avantaĝa.

Mi iĝis estrarano de ĈEA du semajnojn post la fondo de la muzeo. Sincere, dekomence mi estis malferme skeptika, kiom longe ni sukcesos vivteni la muzeon kun nesufiĉo da financoj, homfortoj kaj fakaj kapabloj. Malgraŭ tio, pro solidareco mi estis rapide englutata pli kaj pli en la projekto...

Do kion kaj kiel ni faris dum la pasintaj dek jaroj? Kiel ĉio estis mone prizorgita? Kio el miaj originaj antaŭtimoj fariĝis parte prava kaj kion ni tamen sukcesis superi per niaj streboj? Kaj kiel eĉ malproksime loĝantaj esperantistoj povas ĝui almenaŭ virtuale ion el la rezultoj de nia dekjara laboro? Pri tio bonvolu legi en unu el la venontaj numeroj de *La Ondo*.

**Pavla Dvořáková**